Betula FOLio

Betula FOLio: unufoja ajnisma revuo de la 60-a IJK (la bazejo "Betuleto", Rusio). Fondita (kaj malfondita) en 2004

ISSN 0000-0000

Nu jen, IJK finiĝis, dum mia foresto amasiĝis laboro, sed ial miaj pensoj daŭre forflugas al la kongreso... Por iuj tiu estas jam la deka aŭ eĉ pli, por aliaj (kiel mi) - la unua. Diri, ke la programo estis "plena", "riĉa", "densa" ktp. estas diri nenion. Por mi ĝi estis verdire eĉ "tro" plena - mi ne alkutimiĝis al tiom da aranĝoj samtempe, kiam necesas rezigni plejparton de la programeroj, elektinte nur unu. Sed tio kompreneble estas neniu plendo - simple laŭdo al la organizantoj!

Kiel vi jam vidis, dum la IJK funkciis Amas-komunikilo-centro (*ĉiuj akuzativoj estas metitaj ĝuste, ja ne temas pri amo, sed pri amas-komunikiloj* :-)). Ĉiuvespere la kongresanoj povis spekti novaĵojn pri la kongreso, kaj fine de la kongreso aperis NIA PROPRA kongresa gazeto, farita de la partoprenantoj mem dum la kongreso! Se vi ankoraŭ ne sukcesis legi ĝin en la Kremlo, jen la reta versio (kun iom malpli da tajperaroj :-). Ĉi-ene ni traktos diversajn temojn – kaj seriozajn kaj ankaŭ ne tre – el ĉiu tiu nia bunta ĉiujara festo.

Ni deziras grande kaj elkore danki ĉiujn kiuj kunlaboris: 11 ĵurnalistojn, du fotistojn kaj unu korektiston. Dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis! Karaj kongresanoj! Ni volus vidi VIAJN artikolojn ankaŭ surpaĝe de *Kontakto* kaj TEJO Tutmonde! La venontaj temoj de *Kontakto* estas jenaj: LUDOJ (la 4a numero, limdato - la 15a de aŭgusto; RIFUĜINTOJ/HOMAJ RAJTOJ/TOTALISMO/DIKTATORECOJ (la 5a numero, limdato - la unua de septembro); TERORO/TERORISMO (la 6a, la unua de oktobro. Sendu viajn artikolojn al kontakto@tejo.org, oficejo@tejo.org. Ni vere atendas! Lastpaĝe vi trovos liston de facilaj vortoj por verki por Kontakto. Amuzan legadon!

Ĵenja & Joel.

KONGRESO EN NOMBROJ

Al la 60-a IJK en Kovrov, Rusio aliĝis (kaj pagis) 355 **homoj el 27 landoj. La laŭlanda statistiko dividiĝas jene:**

1. Rusio – 234
2. Svedio, Germanio – po 13
3. Francio – 12
4. Ukrainio – 11
5. Danio, Katalunio, Pollando - po 8
6. Italio – 6
7. Kroatio – 5
8. Nederlando, Norvegio – po 4
9. Kazaĥio, Aŭstrio, Hungario – po 3
10. Bosnio kaj Hercegovino, Portugalio, Usono, Britio, Irano, Belorusio, Taĝikio, Moldavio – po 2.
11. Slovakio, Kanado (Kebekio), Ĉinio, Finnlando – po 1.

210 mendis manĝojn en la manĝejo. 50 mendis vegetarajn manĝojn kaj 13 la veganajn.

3,5 jaroj – estas la aĝo de la plej eta kongresanino – filino de Oksana ZVEREVA.

29 membroj por la jaro 2004 membriĝis en TEJO dum la Kongreso.

11 membroj membriĝis en TEJO por 2005.

40 homoj aliĝis al REJM.

Betula FOLio: unufoja ajnisma 17-paĝa revuo de **la 60-a IJK**, en konsilaj rilatoj kun la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. **Fondita** kaj **malfondita** en 2004. **N-ro 1** (2004:1), la unua jarkolekto. **ISSN** 000000. **Legata** (espereble...) aŭ alimaniere utiligata en ĉ. 27 landoj. **TTT-paĝo:** <http://www.tejo.org>. **Redakcio:** *AKC/Berezka/Repniki/Rusio.* **Ĉef-fuŝ-redaktoro:** Eugenia Zvereva (Ukrainio). **Vic-ĉef-fuŝ-redaktoro:** Joel Amis (Usono/Nederlando). **Ĉef-korektisto** (almenaŭ io ne fuŝa, sed ne ĉio de li provlegita)**:** Pavel Moĵajev (Ukrainio)**. Malkonstantaj kunlaborantoj:** Julija SCHLAPSI (Ukrainio/Aŭstrio), Hektor ALOS i FONT (Katalunio/Hispanio), Normando FLEURY (Kebekio/Kanado), Slavik IVANOV (Rusio), Aleksandro KOVALJ (Belorusio), Irina MIRINOVA (Rusio), Stefa HANISCH (Germanio), Bertrand HUGON (Francio), Joanna JAKIELSKA (Pollando), Oleg ĤARITONOV (Ukrainio), Manfred WESTERMAYER (Germanio). Joel AMIS (Usono), Eugenia ZVEREVA (Ukrainio). Fotistoj: Sjoerd BOSGA (Nederlando/Svedio) kaj Ulf LUNDE (Norvegio).

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj. Nek pri siaj propraj.

Kiel ni naĝas?

La respondo al tiu ĉi demando multe dependas de la tempo kaj geografio. Antaŭ cent jaroj en mia lando kaj eble ĉie en la mondo naĝkostumoj ne multe diferencis de la kutimaj kostumoj. Virinoj naĝis en roboj kaj (jes!) lanaj ŝtrumpoj; viroj – en kostumoj (sen kravatoj tamen). Nun oni kun rideto rigardas tiamajn fotojn… Sed tempoj ŝanĝiĝas, kaj nun pluraj landoj de la mondo (plejparte Eŭropo kaj Nord-Ameriko) inklinas al la malo – tute senvesta naĝado. Do, ĉu vere por iuj el IJK-partoprenantoj naturismo estas io ŝoka? Pri tio enketis nia speciala raportisto – ja ankaŭ nia kongresa "Bajkalo" estis plene libera en tiu ĉi rilato. Ĉar la demando estas sufiĉe tikla, ni ne indikis la nomojn de intervjuatoj – nur la landojn.

Ukrainio:

- Mia opinio pri naturismo estas tute neŭtrala. En la ukraina ĉefurbo estas kelkaj plaĝoj por naturistoj, sed en publikaj plaĝoj naturismo ne eblas. Senvesta naĝado dum IJK ne estas afero tute ŝoka por mi, sed tio ja povas esti ŝoka por kelkaj niaj partoprenantoj, ekzemple, por islamanoj. Ŝajne ke skandinavoj estas plej liberaj pri tio.

Irano:

- Ni, homoj, ja devas diferenci disde la bestoj: ni ja povas mediti, pensadi – besto ne… Mi do opinias naturismon tute malbona: kaj por virinoj, kaj aparte por viroj. En Irano ne estas tiom da libereco, kiel en Eŭropo, tamen ĉe ni ne ekzistas aparta puno por nudistoj – simple neniu volas tion fari. Ni havas apartajn plaĝojn por viroj kaj virinoj, kaj eĉ maro estas disigita. Min ne ŝokas vidi nudajn naĝantojn, tio min nur mirigas. Viro ankaŭ kun vestaĵo estas ja tre bela!

Taĝikio:

- Ĉiuj homoj naskiĝas nudaj, kaj ni devas rigardi al tio de la filozofia vidpunkto. Naturismo do ne estas peko, sed, bedaŭrinde, en mia lando oni ne estas tiel liberaj. Ni devas obei niajn morojn, kaj pro tio en Taĝikio oni ne rajtas esti nudaj en la plaĝoj. En nuntempa Taĝikio tamen loĝas homoj de ĉiuj religioj (ĉe ni eĉ islamanoj rajtas drinki). Kial do ne?! Se homo volas tion fari, mi ne kontraŭas. Sed mi mem ankoraŭ ne adaptiĝis al tiu ĉi nivelo…

Bosnio kaj Hercegovino:

- Mi ne havas iun specialan opinion. Ĉiuj povas esprimi sin mem... En Bosnio oni ĉiam havis apartajn pornudistajn plaĝojn ĉe marbordo, kaj mi pensas, ke devas esti apartaj lokoj por tio.

Italio:

- Kial mi devas esti kontraŭ? Dividiĝo de la plaĝoj en Italio jam restis en pasinteco (eble en suda bordo ĝi ne tute malaperis). Do, ne estas problemo!

Aŭstrio:

- Mi ne konsideras min reprezentanto de tuta Aŭstrio, sed mi pensas, ke devas esti interkonsento pri apartaj horoj, dum kiuj oni rajtas naĝi senveste. Sed tiuj aferoj okazas spontane, kaj preskaŭ ne eblas kontroli tion.

Norvegio:

- Se homoj volas – do faru ili! Sed ne en publikaj lokoj. Devas esti specialaj plaĝoj. Ĉe ni nur infanoj rajtas naĝi nude en publikaj plaĝoj.

Germanio:

- Se homo havas bonan figuron – faru!

Dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis en la demandado!

Intervjuis Julija SCHLAPSI (Ukrainio/Aŭstrio)

“Ju pli saĝaj homoj estas, ju pli bonan kulturnivelon li aŭ ŝi havas, des pli bone ili rilatas al naturismo”

Al tiu ĉi kaj aliaj demandoj respondas Valentin MELNIKOV, intervjuita en la antaŭlasta tago de la kongreso.

- Kial oni aliĝas al naturistaro?

- Ĉar tio estas plezuro! Tiam vi ĝuas sunon, aeron kaj akvon per la tuta korpo; nenio malhelpas, kaj tiuj malsekaj ĉifonoj ĉiam malagrablas post la naĝado. Naturismo nomiĝas ĝuste tiel, ĉar la korpo estas en natura stato. Estas vere agrabla sento, kiam vi naĝas, akvo ĉirkaŭfluas la tutan korpon, neniel haltante.

- Sed dum gejunulaj renkontiĝoj - eble oni bezonas interkonsenton kun la aliaj?

- Kial interkonsenton? Vidu, ĉi tie, bedaŭrinde, oni ne povas iri al la rivero, ĉar estas malproksime, kaj la baseno estas tro malgranda kaj unu por ĉiuj. Bedaŭrinde, ĉi tie oni ne estas tiel liberaj, kiel en aliaj basenoj. Sed ĝenerale en niaj rusaj esperantistaj tendaroj tio estas normala kaj ofta kutimo.

Mi scias, ke tio komenciĝis en la jaro 1989, kaj mi mem tion spertas ekde la jaro 1991. Dekomence en nia programo estis eĉ iuj prelegoj pri naturismo, oni rakontis kaj klarigis, kio ĝi estas, pro kio ĝi bonas ktp. Kutime aliĝis kelkaj personoj - oni iris kvinope, dekope al iu iomete apartigita loko, kaj tie naĝis. Iel formiĝas etoso en tendaro. Oni simple alkutimiĝis, ke estas naturistoj, eĉ se ni estas dek metrojn for de la cetera kompanio. Ekzemple, renkontiĝo apud Smolensk en 1993 okazis apud granda lago, sed ĉe la bordo ne estis arboj, kaj do ne eblis ie sin kaŝi. Do, sen problemoj ni simple iris iomete flanken kaj nin vidis tutegale ĉiuj, kaj - neniuj problemoj.

- Ĉu nur viroj kutime partoprenas?

- Mi ĉiam venas kun la edzino. Ankaŭ kelkaj aliaj konatoj de ni esperantistoj regule partoprenas.

Mi jam delonge rimarkis tian fenomenon: ju pli saĝaj homoj estas, ju pli bonan kulturnivelon li aŭ ŝi havas, des pli bone ili rilatas al naturismo, kaj des pli partoprenas mem.

- Mi ne certas pri tio. Mi kontaktis tre bone edukitajn homojn, kaj tamen trovis tiujn, kiuj havas tre fortajn antaŭjuĝojn aŭ tre fortajn kulturajn barilojn.

- Mi volis diri, ke proporcie, inter “altnivelaj” homoj pli ofte troviĝas naturistoj ol inter malkleraj personoj. Cetere, same kiel rilate al Esperanto. Kiam en naturistaj kompanioj, simple en naturista plaĝo en Moskvo, mi rakontis ion, mi neniam aŭdis stultajn mitojn, ke Esperanto estas malviva lingvo, kiu celas anstataŭi aliajn lingvojn ktp. Ĉiuj reagas pozitive. Same okazis, kiam mi partoprenis la movadon de intelektludantoj, kie certe kolektiĝas homoj kun tre alta intelekta nivelo. Ankaŭ inter ili estas kelkoble pli da naturistoj proporcie.

Mi ne scias, kiom da naturistoj ekzistas. Se, ekzemple, estus kondiĉoj, kaj oni proponus al ĉiuj homoj aliĝi, inter ordinaraj homoj eble aliĝus unu el dek, sed inter intelektludantoj, laŭ mia sperto, pli ol duono pretas.

- Laŭ vi, kiom ofte necesas naturismumi por nomi sin naturisto? Ĉu sufiĉas unufoje fari tion?

- Fakte, tiu demando, laŭ mi, estas nekorekte formulita. Simple ĉiam, kiam mi volas naĝi, mi preferas fari tion nude. Nur se estas absolute malfavoraj kondiĉoj, se estas nur unusola loko kaj estas amaso da homoj, tiam mi, kun bedaŭro, estas devigita uzi vestojn. Sed, ĉiam kiam eblas, mi preferas esti nuda, ĉar tio pli agrablas kaj utilas...

- Oni uzas la vortojn “naturismo” kaj “nudismo”. Ĉu estas diferenco?

- Nudismo estas emo ne surhavi vestaĵojn, kiam tio eblas. Naturismo estas emo vivi agorde kun la naturo. Do, nudismo estas parto de naturismo. La ceteraj partoj estas: nefumado, nedrinkado (laŭ mi, tio nepras); plie oni “aŭskultu sian korpon” kaj faru tion, kio agrablas kaj utilas. Ekzemple, mi preferas vegetarajn manĝojn, ŝatas paŝi nudpiede, hardi min per malvarma akvo. Se vi amikas kun la naturo, vi ne malsanas, vivos longe kaj ĉiam estas vigla korpe kaj mense!

La Ĝen-Sek: “Esperantistoj interesiĝas ne nur pri Esperanto...”



Dum la IJK kelkaj homoj ne nur amuziĝas, sed ankaŭ kunvenas por labori. Inter ili plej elstaras la komitato de TEJO, ĉar ĝia laboro permesas, interalie, ke ni ĝuas ĉi tiun kongreson. Tial ni turnas nin al Aleks KADAR, ĝenerala sekretario de TEJO, por ke li rakontu al ni pri la laboro de tiu komitato.

- Kiom da homoj partoprenas en la komitatkunvenoj de TEJO?

- Temas pri 12 homoj, reprezentantaj entute 18 TEJO-komitatanojn per la transdonitaj voĉdonrajtoj, tio estas duono de ĉiuj komitatanoj. Per tio la kvorumo estas pli ol sufiĉe atingita. Tiuj komitatanoj reprezentas la landajn sekciojn, la fakajn, la estraron kaj la individuajn membrojn, per kio ili tre bone respegulas la tutan asocion.

- Laŭ la provizora tagordo legebla en la kongreslibro, ŝajne la plej esenca punkto de la diskutoj estas la strategia laborplano. Kiun tempodaŭron ĝi celas?

- La strategia laborplano estis ellaborita de aŭtuno 2003 ĝis printempo 2004 kaj ĝi principe celas la du-jaran periodon de nia estraro. Kompreneble la venonta estraro povas konsideri ĝin utila kaj sekvi ĝiajn gvidliniojn, same kiel ni baziĝis sur la t.n. mini-programo de la antaŭa estraro, sed ĝi povas decidi ion alian.

- Ĉu vi povus skizi la gvidliniojn?

- La laborplano difinas kvar ĉefajn prioritatojn: sekurigon de bazaj funkcioj, soci-utilan agadon, aktivulan trejnadon kaj informadon. Ĝi estis ellaborita surbaze de enketoj al la membroj, la specifa retlisto “estonto” kaj la partoprenantoj en la Tut-Eŭropa Junulara Konferenco.

- Ĉu vi povus klarigi, kion vi komprenas kiel bazajn funkciojn?

- Sekurigo de bazaj funkcioj entenas kvar ĉefajn punktojn: dungiton, duan volontulon, aktivan kunlaboron kun la Centra Oficejo de UEA kaj juran personecon disde UEA (t.e. ricevi registro-numeron kaj bankkonton).

- Tiuj temoj kaŭzis akran konflikton inter la eksa estraro de TEJO kaj tiu de UEA. Kiel nun statas la afero?

- Pri la jura personeco ni multe diskutis, kaj UEA akceptis tiun evolu-on. Pri la dungito kaj la dua volontulo, TEJO tion entreprenos per siaj propraj rimedoj. Aliflanke, ne temas plu pri sendependiĝo.

- Ĉu vi povas klarigi, pri kio temas la soci-utila agado?

- Iusence ĝi estas subpunkto de la aktivula trejnado. Ni celas akcenti, ke esperantistoj interesiĝas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri nia ĉirkaŭa medio. En tiu kampo ni celas organizi jaran seminarion.

- Jen ambicia celo. Ĉu pli da seminarioj vi planas organizi?

- Jes, kompreneble: entute po du aŭ tri jare, por kovri la kampon de la aktivula trejnado. Tiucele ni komencis esplori la bezonojn de la landaj sekcioj, kaj surbaze de iliaj respondoj, ni povos pli bone taksi la bezonojn kaj prioritatojn. Principe, la ĉefaj antaŭvidataj gvidlinioj estas projekto-mastrumado, organiza mastrumado kaj interkulturo, sed povas aldoniĝi pliaj.

- Pri informado, supozeble vi multe kunlaboros kun la Brusela Komunikad-Centro de Eŭropa Esperanto-Unio kaj UEA, ĉu ne?

- Kompreneble, tio estas unu el la punktoj, tamen ni ĉefe koncentriĝos pri interna informado. Ekzemple, ni strebas por altigi la nombron de abonantoj de la senpaga reta informletero *TEJO-Aktuale* de iom pli ol 400 ĝis 1000 (aliĝi eblas rete ĉe <www.tejo.org>). Ni volas dissendi informojn al naciaj kaj internaciaj dissendlistoj, ne nur al la komitato. Ni celas plipopularigi la Retan Informad-Centron (www.ikso.net/ric), kie eblas elŝuti kaj alŝuti informajn materialojn, kaj ankaŭ Dialog’, la retan naciling-van informejon pri aktivaĵoj de TEJO, troveblan ĉe <www.tejo.org/tejo_aktuale>.

- Ni kore dankas pro viaj klarigoj kaj deziras al la tuta komitato tre sukcesan laboron!

Intervjuis Hektor ALOS i FONT, Katalunio

Dagestano: insulo de paco en Kaŭkazio

La nomo de Abdurahman JUNUSOV (Rusia Federacio, Dagestano), estas konata, verŝajne, al plejmulto de la rusaj esperantistoj. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis okazon konatiĝi mi prezentos lin: delegito de UEA, eks-prezidanto de REU kaj ĉef-redaktoro de la dagestana homrajta gazeto "Dagestana rakurso", kie cetere regule (en ĉiu numero!) aperadas artikoloj pri Esperanto. Ĉi-sube vi povos legi fragmenton de la intervjo farita dum la kongreso. La plenan version legu en *Kontakto*.

- Mi aŭdis pri la ideo okazigi EoLA-n 2005 en Dagestano. Sed ĉu ne estas danĝere tie? Ĝi ja najbaras kun Ĉeĉenio…

- Fakte, mi tre ofte aŭdas tiun ĉi demandon – eble pro tio, ke multaj pensas, ke en Kaŭkazio ĉio estas sama. Sed Kaŭkazio ne estas io homogena – ĝi estas tre multnacia kaj multsituacia regiono, kaj certe en tiu regiono estas multe da problemoj. Dagestananoj tamen ĝojas, ke post disfalo de Sovet-Unio Dagestano restas la sola paca "insulo" en Kaŭkazio. Ja ĝis nun en kelkaj lokoj estas konfliktoj – inter Osetio kaj Kartvelio (Ingušio), Kartvelio kaj Abĥazio, Armenio kaj Azerbajĝano, kaj plej gravaj estas la ambaŭ Ĉeĉeniaj militoj. Certe estis danĝero, ke ankaŭ Dagestano povus engaĝiĝi en iuj el la problemaj konfliktoj, sed venkis prudento. Persone mi supozas, ke tio okazas pro tio, ke Dagestano estas multnacia kaj multpopola respubliko, kie dekoj da popoloj alkutimiĝis vivi en paco kaj solvi ĉiujn problemojn amike. En Dagestano, kiu konis multajn malfacilajn periodojn, neniam estis internaj militoj inter dagestanaj popoloj. Oni ĉiam trovadis solvojn, se aperis problemoj. Kaj same nun.

Mi rememoras pri invado de ĉeĉeniaj trupoj… Verŝajne, estis la fortoj, kiuj volis, ke Dagestano estu "brulanta insulo", anstataŭ insulo de paco. Sed nun ĉio estas pli kvieta. Certe, ekzistas mafiaj klanoj, korupto, ekonomiaj problemoj. Sed mi rimarkis, ke dum lastaj jaroj la vivo pliboniĝas. Ekzemple, antaŭ militoj en Ĉeĉenio min ofte vizitadis esperantistoj kaj neesperantistoj el diversaj landoj – Belgio, Francio, Usono, Germanio, Pollando… Sed poste dum iu periodo preskaŭ ne estis gastoj. Kaj nun denove min vizitadas geamikoj. Antaŭnelonge gastis ĉe mi esperantistino el Germanio, baldaŭ venos italoj… Tio signifas, ke homoj ankaŭ el aliaj landoj scias, ke Dagestano ne estas io militanta kaj terura… Mi fojfoje sentas min pli defendita en Dagestano ol, ekzemple, en Moskvo. Niaj homoj estas amikemaj, tre gastamaj, bonkoraj kaj ĉiam restas tradicio helpi unu al la alia en iu ajn situacio.

- Kiuj lingvoj estas fakte parolataj en Dagestano?

- Interesa afero: oni ĝis nun ne povas tion kalkuli... Iuj sciencistoj asertas, ke tridek, aliaj – ke ĝis sepdek! Ĉar fojfoje ne estas klara diferenco inter lingvo kaj dialekto… Alia momento estas politika. Dum Soveta tempo (ekde la 30-aj jaroj de la 20a jarcento) oni faris tiel: grupigis por kelkaj popolojn ĉirkaŭ unu, nomis tiun popolon "pli granda" kaj "pli ĉefa". En Dagestano ekzistis 32 ĉefaj nacioj (aŭ etnoj), 14 el kiuj poste malaperis ĝuste pro tiu "grupigado". Sed post Perestrojko multaj el tiuj nacioj protestis, ja foje ili eĉ ne komprenis la lingvon de nacio, sub kies nomo ili estis skribitaj… Post tio denove okazis iu "dispecigo" je pli multaj popoloj. En Dagestano aperas gazetoj kaj ĵurnaloj en 15 lingvoj, kaj dagestana radio ĉiutage disaŭdigas siajn elsendojn en 14 lingvoj.

- Kaj kiu vi estas laŭ nacieco? Ĉu vi komprenas multajn el tiuj lingvoj?

- Mi estas lako, kaj eĉ unu vorton, ekzemple, en la avara lingvo mi ne komprenas nek scipovas prononci, ĉar estas tute alia sistemo de sonoj. La lingvoj en Dagestano estas vere diversaj kaj tre malsamaj!

Pli junas aŭ Plijunas?..

Plijunas **estas kromnomo de Mathias DALMOSE, 21-jaraĝa junulo el Danio. La fratoj ludas diverslandan, ĉefe keltan, viglan popolmuzikon (Junas – violone, Mathias – gitare), kaj ilia muziko klare (kaj ŝajne senescepte!) plaĉis al ĉiuj kongresanoj. Nia korespondento ne povis maltrafi la okazon intervjui Plijunas :-) por nia FOLio.**

- Kiu unue eklernis Esperanton - vi aŭ Junas?

- Junas lernis kelkajn jarojn antaŭ mi, sed mi ne plu certas, kiam precize. Fakte nia patro lernis Esperanton antaŭ eble dek jaroj.

- Do, ĉu via patro aŭ frato instruis al vi Esperanton?

- Ne, antaŭ du jaroj mi renkontis svedon, kiu parolis al mi pri E-lernejo en Karlskoga, Svedio. Mi lernis tie.

- Kiel vi elektis vian nomon?

- Ĝi aperis en 2003 por la IJK en Svedio. Mi ne plu certas, kiel ĝi estiĝis, sed oni invitis nin koncerti tie. Ili konis Jonas, kaj en la sveda lingvo tio prononciĝas kiel *Junas*. Oni sciis ankaŭ, ke mi pli junas, do, tiel estis skribite en la programo "Koncerto de Junas kaj pli Junas".

- Ekde kiam vi koncertas en Esperanto?

- Nia unua koncerto okazis en Svedio dum la IJK. Poste ni koncertis dum la UK en la sama lando, dum la IS en Germanio kaj dum la IF en Italio. Nun ni estas en Rusio por la IJK kaj poste ni koncertos en Bilbao dum la Eŭropa Kongreso de Esperanto.

- Tute aliteme. Kion vi farus, se vi gajnus milionon da eŭroj?

- Mi certe volus liberiĝi de ĉiutaga laboro. Mi havus pli da tempo por muziki. Mi ankaŭ aĉetus insulon en la sudo por fondi Esperantion, por vivi pace tie kun esperantistoj.

- Dankon, estis vere plezuro iom paroli kaj konatiĝi kun vi.

Intervjuis Normando FLEURY, Kebekio



Ĉu esti aŭ ne esti?

Vi certe rimarkis, ke en la kongresa manĝejo estis sufiĉe granda spaco por vegetaranoj kaj veganoj. Ni do enketis pri la kialoj esti aŭ ne esti vegetaranoj. Unue, kion opinias la viandemuloj pri vegetarismo?

Mi demandis kelkajn kongresanojn, kial vi manĝas viandon? La respondoj estis diversaj. Unue - respondoj de Saŝa KOVAL, Belorusio (pli detale pri lia opinio – sekvapaĝe):

- Estas normale por sana homo manĝi viandon. Ĝi estas facile digestebla, nutra kaj kun kompletaj aminoacidoj (proteinoj).

- Sed ĉu vere nia korpo facile digestas viandon?

- Ni estas primatoj, - daŭrigas Saŝa, - kaj primatoj manĝas birdojn kaj aliajn bestojn, kiam ili sukcesas kapti ilin. Niaj dentoj estas diversaj, do, ne nur por manĝi plantaĵojn.

- Sed ĉu vi ne pensas, ke tio estas kontraŭekologie bredi tiom da bestoj por produkti viandon?

- Mi ne povas argumenti pri tio.

- Kion vi pensas pri la etika vidpunkto, rajto kaj maniero mortigi bestojn?

- Mi iam vizitis buĉejon, mi vere esti ŝokita pri la sango, la odoro kaj la distranĉado de la bestoj…kaj ne povis manĝi viandon poste dum du jaroj. Sed poste oni forgesas pri tio. Mi ne estas kontraŭ vegetarismo, mi havas amikojn kiuj estas vegetaranoj.

Kaj jen la diversaj respondoj de Olof, Gabriele, Daniel kaj Olga pri viandemo:

- Mi provis dum du jarojn esti vegetarano sed mi ŝatas manĝi viandon.

- Mi havas rapidan digestadon, kaj viando malrapidigas ĝin. Plaĉas al mi la gusto.

- Mi havas multajn alergiojn al vegetaĵoj.

- Sed kio pri mortigo de bestoj?

- Ne mortigo estas la problemo, sed la *kondiĉoj* pri mortigo. “Bestoj manĝas unu la alian”. Kaj ili ne vere sciis pri la ekologiaj problemoj kaŭzitaj de industria besto-bredado.

Nun, mi lasu la vegetaranojn reagi kaj respondi al la demando, kial vi estas vegetaranoj?

“Pro la skandalo en la vianda produktado”, “homoj ne bezonas manĝi viandon por sane vivi”, “mi ne ŝatas, ke oni mortigas bestojn”, “tro da viando ne estas bone por la sano”, “mi ne ŝatas la guston de viando”, “ĉar mi ne emas al viando-manĝado”, “mi pli ŝatas ricevi energion de la tero pere de la plantoj”, “mi sentas min pli bone kiam mi ne manĝas viandon, mia korpo estas pli pura”, “oni tro malbone traktas la bestojn”, “estas tre malbone por la naturo, multe da poluado, ĉar estas tro da bestoj”, “oni detruas la tropikajn arbarojn por produkti pli da viando, por havi pli da spaco por bovoj”, “mi sentas min pli peza, pli laca post manĝado de viando”, “antaŭe oni parolis pri la rajtoj de virinoj, poste pri la rajtoj de nigruloj, estas nun tempo paroli pri la rajtoj de la bestoj!”

Mi dankas al ĉiuj, kiuj respondis. Kaj nun vi decidu (aŭ provu decidi) ĉu vegetarismo plaĉas al vi.

Intervjuis Normando FLEURY

La vero estas "ora" mezo!

Homo estas animalo, kiu povas manĝi miksitajn nutraĵojn – kaj vegetarajn, kaj viandajn. Pri tio atestas analizo de la gastro-intesta sistemo: 1) ni havas unukameran stomakon, sed ne multkameran, kiel bovoj; 2) ni ne havas enzimojn, kiuj digestas celulozon; 3) niaj plej proksimaj parencoj – simioj – manĝas kaj fruktojn kun legomoj, kaj viandon; 4) rigardu viajn dentojn – tie vi trovos kojnodentojn.

Ekzistas tri tipoj de vegetaranoj: striktaj vegetaranoj, kiuj manĝas nur plantojn (oni ofte nomas ilin veganoj); lakto-vegetaranoj (veganoj, kiuj tamen trinkas lakton kaj manĝas laktaĵojn); kaj ovo-lakto-vegetaranoj. La lastaj du tipoj ŝajnas esti senproblemaj, sed la unuaj povas sperti deficiton de esencaj aminoacidoj, ĉar la proteinoj de plantoj, precipe cerealoj, ne estas plenvaloraj*, malfacile atingeblas pro celulozo**. Krome, post la digestado la aminoacidoj estas ensorbataj en intestoj laŭ la leĝo: ĉio aŭ nenio. Se mankas unu aŭ kelkaj aminoacidoj, ensorbado de la ceteraj malboniĝas. Tio povas kaŭzi "proteinan malsaton"*** kaj ĉe infanoj la malsanon, kiun oni nomas *küaŝiorkoro*. Pro tio ne estas kialo absolute rifuzi nevegetarajn manĝaĵojn. Tamen povas esti situacioj, kiam homo prefere evitu multe da viando (en kazo de podagro, hepata misfunkcio, operacioj je stomako k.a.).

En modernaj kondiĉoj homoj pli emas obezi. Tial vegetara menuo helpas malpliigi la kaloriecon de manĝaĵoj. Krome, celulozo absorbas galajn acidojn, kiuj devenas de kolesterolo. Tial la nivelo de kolesterolo en organismo malpliiĝas, kio povas esti utila kontraŭ aterosklerozo. Se homo ne havas problemojn pri la sano, ne estas neceso iri al la ekstremaĵoj: nura vegetaranismo aŭ viandomanĝado. Oni ne devas ignori nek animalajn, nek kreskaĵajn nutraĵojn. La vero estas meza!

* Ofte mankas tie triptofano kaj iam aminoacidoj: lizino, arginino, histidino, kiuj estas interalie gravaj por bona digesto en stomako, ĉar ili povas akiri pozitivan ŝarĝon en acida medio de stomako, kio estas necesa por ŝveliĝo de proteinoj kaj plifaciligas agadon de enzimoj.

** Ĉeloj de kreskaĵoj estas ĉirkaŭitaj de celulozo, kio malebligas al la enzimoj atingi la proteinojn. La ĉeloj de fungoj estas ĉirkaŭitaj de simila substanco – kitino, kiu estas same nedegistebla por la homo.

*** Tamen cerealoj enhavas la proteinon gliadinon. Ĉe kelkaj individuoj ĝi povas kaŭzi glutenan malsanon.

Aleksandro KOVALJ, Belorusio
Profesora asistanto pri biokemio en Gomela Ŝtata Medicina Universitato, kandidato de biologiaj sciencoj.

Saniga sistemo de Porfirij IVANOV

En la jaro 1991 mi estis, milde dirante, ne tute sana. De kie aperadis miaj multaj malsanoj, mi tute ne povis kompreni, ĉar de infaneco mi havis sanan vivmanieron: ĉiumatene gimnastikis, multajn jarojn eĉ kuradis laŭstrate, poste lavis supran parton de mia korpo per malvarma akvo, neniam fumis kaj post la jaro 1976 tute ne trinkis alkoholaĵojn. Sed malgraŭ tio miaj malsanoj de jaro al jaro plimultiĝis.

Tute hazarde mi eksciis pri la saniga sistemo de Porfirij IVANOV. En radioelsendo mi subite ekaŭdis ion pri priverŝado de la tuta korpo per malvarma akvo, kiu kvazaŭ faras miraklojn por la homa sano. Preskaŭ duonjaron mi ne povis kuraĝigi min fari la samon. Sed en decembro dum akutiĝo de mia kutima angino mi finfine, reveninte post la laboro hejmen, eliris el la domo en naĝkostumo kun sitelo da malvarma akvo, ekstaris sur la neĝon kaj priverŝis min per malvarma akvo. Kaj vera miraklo okazis. De post tiu momento mia angino tute malaperis kaj poste poiome malaperis aliaj malsanoj. Post duonjaro mi malkovris, ke priverŝado ne estas la sola ago, kiun oni povas fari por propra sano laŭ konsilo de Porfirij IVANOV.

Li post longjara esplorado de la propra korpo ellaboris 12 regulojn por tute sana vivo. Unuafoje ili estis publikigitaj en la sovetia revuo “Ogonjok” (Fajreto) en la jaro 1983. Tiu ĉi regularon oni nomas “Detka” (bebo) laŭ la unua vorto, per kiu Porfirij IVANOV (kiu estis dum apero de la teksto jam 85-jara) turnis sin al la legantoj de la revuo.

Do, jen…

BEBO!

Ĉu vi estas plena de deziro alporti utilon por la popolo? Por tio vi penu esti sana. Koran peton al vi: prenu de mi kelkajn konsilojn por fortigi vian sanon.

1. Dufoje dum tago plonĝu en naturan malvarman akvon, por al vi estu bone. Plonĝu, kie vi povas: en lago, rivero, prenu duŝon aŭ priverŝu vin. Tio estas viaj kondiĉoj. Varman plonĝon (lavadon) finu per malvarma akvo.

2. Antaŭ lavado aŭ post ĝi, kaj, se eblas, do kune kun ĝi venu al naturo, ekstaru nudpiede sur teron kaj vintre sur neĝon almenaŭ por 1-2 minutoj. Enspiru per la buŝo kelkfoje aeron kaj pense deziru al vi mem kaj al ĉiuj homoj sanon.

3. Ne uzu alkoholon kaj ne fumu.

4. Penu almenaŭ unufoje dum semajno vivi tute sen manĝo kaj akvo. Tio estas viaj meritoj kaj trankvilo. Se tio al vi estas malfacila, do tenu vin almenaŭ diurnon.

5. Je la 12-a horo tage en dimanĉo venu al naturo nudpiede kaj kelkfoje spiru kaj pensu tiel, kiel estas skribite supre. Tio estas festo de via korpo. Post tio vi povas manĝi ĉion, kio al vi plaĉas.

6. Amu la naturon, ĉirkaŭantan vin. Ne kraĉu ĉirkaŭe kaj ne elkraĉu el vi mem ion. Alkutimiĝu al tio: tio estas via sano.

7. Salutu ĉiujn ĉie kaj en ĉiuj lokoj, precipe la aĝajn homojn. Se vi volas havi sanon — salutu ĉiujn. *(La rusa vorto «здравствуйте» signifas ne nur saluton, sed ankaŭ deziron de sano.)*

8. Helpu al homoj kiel vi povas, precipe al malriĉulo, malsanulo, ofendito, malzorgito. Faru tion kun ĝojo. Reeĥu al lia bezono anime kaj kore. Vi akiros en li amikon kaj helpos al paca ago.

9. Venku en vi mem avidecon, pigron, memkontentecon, ŝtelemon, timon, hipokritecon, fieron. Kredu al homoj kaj amu ilin. Ne diru pri ili nejuste kaj ne akceptu serioze nebonajn pensojn pri ili.

10. Liberigu vian menson de pensoj pri malsanoj, malbonfarto, morto. Tio estas via venko.

11. Penson ne disigu de ago. Se vi tralegis – tio estas bona. Sed plej ĉefe – AGU!

12. Rakontu, transdonu la sperton de tiu ago, sed ne fanfaronu kaj ne gloru vin pro tio. Estu modesta.

Irina MIRONOVA, Rusio

Opinie

Mi persone havas tute pozitivan impreson pri la sistemo de IVANOV, malgraŭ ke mi neniam obeis ĝin. Uzado de akvo por plifortigi la sanon estas, verŝajne, la plej antikva speco de fizioterapio. Kompreneble, gravas modereco, do, oni neniuokaze saltu en glaciiĝintan riveron vintre tute sen anticipa sinpreparo. Fumado estas memkompreneble malutilega por la sano, tamen pri alkoholo mi persone estas malpli severa (oni pruvis, ke la dozo ĝis 50 gr. da alkoholo tagnokte estas eĉ utila por la sano). Modera fastado same impresas min, kiel normala kaj saniga afero. Do, laŭ mia opinio, la sistemo de IVANOV estas ne io stranga, sed tute simpla kaj klara sistemo de tute facile sekveblaj rekomendoj.

Pavel MOĴAJEV (profesia medicinisto)

„Per Pasporta Servo al 61a IJK en Zakopane”, aŭ: “Nokte vizitis vin ZAMENHOF…”

Unu el programeroj de la 60-a IJK estis ludo pri *Pasporta Servo*. Ĝia temo estis “Per *Pasporta Servo* al la 61a IJK en Zakopane / Pollando”.

Dum la ludo, la partoprenantoj povis ekscii pri *Pasporta Servo* kaj eĉ uzi ĝin dum virtuala vojaĝo. La reguloj estas simplaj. Ĉiuj el kvin grupoj lotumis start-urbon (ekz. Bonaeron en Argentino aŭ Xinxiang en Ĉinio) kaj dum ok paŝoj devas “atingi” Zakopane. Sed tio ne estas ĉio. Ĉiu grupo por fari paŝon devas lotumi karton “Kien veturi”, kiu (mal)faciligis la ludon. Ekzemple: “Nokte vizitis vin Ludoviko ZAMENHOF. Vizitu lian tombon en Varsovio”, aŭ: “Vi forgesis vian dentobroseton. Revenu hejmen”, aŭ: “Atakis vin volapukistoj. Vi devas resti kelkajn tagojn en malsanulejo”. En ĉiu trapasata urbo ludantoj devis trovi gastiganton uzante *Pasportan Servon* kaj skribi lian aŭ ŝian nomon sur speciala tabulo. Kvankam mankis tempo por fini la ludon, plej proksime al la celo estis Samir RIBIĈ el Bosnio kaj Hercegovino. Gratulon al li.

Kaj jen la reguloj:

Komence ni mallonge rakontas, kio estas *Pasporta Servo* kaj kiel oni povas uzi ĝin.

Se eblas, ni kreas samnombrajn grupojn; se ne - diversnombrajn (1-4 personoj en grupo). Maksimume povas esti 12 grupoj (de A ĝis I).

Ĉiu grupo lotumas karton kun start-urbo kaj karton „Via grupo” (kiu karakterizas la grupon). La kartojn oni metas/gluas sur la tabulon.

La celo de la ludo estas veni de la starturbo ĝis Zakopane (al la 61a IJK) dum ok paŝoj. Tamen grupo ne rajtas alveni al Zakopane antaŭ la oka paŝo.

Ĉiu grupo por fari paŝon devas lotumi karton „Kien veturi”, kiu (mal)facilagas la ludon.

Por ĉiu paŝo ĉiuj grupoj ricevas kvin minutojn. Dum tiu tempo ili devas elekti (uzante libreton *Pasporta Servo*) landon, urbon kaj gastiganton kaj skribi tiujn informojn sur la tabulo. Se iu gastiganto jam estas okupita, alia grupo povas gasti ĉe ŝi/li nur se ŝi/li havas ankoraŭ liberajn lokojn.

Se grupo ne povas plenumi la kondiĉojn, ĝi perdas sian vicon (ne ricevas poenton kaj restas en sama loko ĝis la sekva paŝo).

Por ĉiu sukcesa paŝo (t.e. grupo trovis gastiganton plenumante ĉiujn kondiĉojn) grupo ricevas poenton.

Venkas tiu grupo, kiu kun la plej granda poentaro atingos Zakopane-n en la oka paŝo.

La tri plej bonaj grupoj fine de la ludo devas interese (bunte!) rakonti pri sia vojaĝo al Zakopane.

Joanna JAKIELSKA (Pollando)

TEJO Aktuale

Gazetara konferenco pri IJK

La IJK okazas jam duan fojon en Rusio, en turista ripozejo Berezka (Betulo), kie REJM konstante organizas Esperanto-tendaroj. En la IJK partoprenas ĉirkaŭ 340 personoj. Vitalik MALENKO (prezidanto de REJM): “Nia Kongreso estas Internacia, juna kaj kuna. Enkadre la Kongreso okazigis diskutojn pri la Movado, Esperantaj aferoj kaj nia landa organizo. La organizan teamon konsistas kelkaj dekoj da homoj, kiuj estas el kelkaj Esperanto-centroj de Rusio, sed la plej multaj estas el Moskvo kaj Ĉeboksaro. Kadre de la Junulara Kongreso okazis programeroj dediĉitaj al rusa kulturo. Ekzemple, ni instruas rusajn popolkantojn, ni vidas prelegojn pri kulturo, estas dunivelaj kursoj pri la rusa ligvo k.t.p.”

Andrej GRIGORJEV

10-17 de julio apud urbeto Kovrov okazas la 60a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Inter aliaj interesaj aranĝoj, la 13an de julio okazis gazetara konferenco, en kiu estis invititaj Bertrand HUGON (prezidanto de TEJO), Vitalij MALENKO (prezidanto de REJM), Daniela TAGLIAFICO (prezidanto de la Itala E-Junularo) kaj Ulf LUNDE (prezidanto de Norvega E-Ligo). Dum la konferenco evidentiĝis, ke el 42 landaj sekcioj de TEJO nur 20 estas sufiĉe aktivaj por povi okazigi IJK-on. En Norvegio nuntempe junulara povado estsa pli forta ol plenkreskula, sed tamen tio ne sufiĉas por organizi IJK-on. Por pliaj informoj rigardu <www.tejo.org>.

Julija SCHLAPSI

Pli ol dekkvar!

Por kalkuli la "indekson de heroeco" oni dividu la kvanton de partoprenantoj de IJK en Kovrov per la meza aĝo de ili. Ekzemple 350:25=14 estas la "Indekso de heroeco" por IJK 2004!

Ju pli alta ĝi estas, des pli bone!

Tio ja signifas, ke la arranĝo havas aŭ multajn partoprenantojn, aŭ multajn junajn partoprenantojn, aŭ ambaŭ samtempe. Kaj ĝuste tion celas la organizantoj de la sekvanta IJK en Zakopane.

La kondiĉoj kongruas: Zakopane situas en la mezo de Centra Eŭropo, ĉe la slovaka landlimo, proksime de Ĉeĥio, Hungario, Rumanio kaj Aŭstrio. La loko estas facile atingebla per trajno aŭ buso el Varsovio.

La multenombrajn partoprenantojn atendos ejo ĉirkaŭata de montoj kaj ĉiutagaj ekskursoj al la Tatry-montaro, tamen apud riĉa infrastrukturo de kafejoj, bierejoj kaj vendejoj. Tie oni produktas bongustan fromaĝon el ŝafa lakto, kies odoro estas neforgesebla.

Por vespera programo okazos E-karaokeo, filmprezentoj, diskotekoj kaj bonega biero. Kompreneble, eblos babili kun aliaj gesamideanoj, drinki kaj trinki…

La LKK konsistas interalie el Irmina SZUSTAK (21) kaj Janusz MYZIK (20), kiuj planas helpe de IJK, unue, vigligi la junan junularan movadon en Pollando kaj - due - integriĝi pli kaj pli la handikapitojn – do tiamaniere atingi "Unuecon en diverseco".

Dum la IJK aperos temoj pri komunikiloj de blindaj kaj surdaj homoj, kio tuŝas egalrajtecon de handikapitoj. Sed tio ne estas ĉio: per diskutgrupoj, prelegoj kaj aliaj programeroj ni volus diversforme prezenti laŭeble multajn aspektojn de egalrajteco.

Aliĝu rekte al IJK aŭ vizitu retpaĝojn <www.tejo.org/ijk> aŭ la kluban paĝon de *Varsovia Vento* <www.republika.pl/viavento>.

UK – IJK – IJS

Se vi planas veni al Zakopane post la UK en Vilno, simple uzu trajnon de la litova ĉefurbo al Varsovio. Kaj post la IJK vi bezonas nur momenton por translokiĝi al Hungario kaj partopreni IJS-on. Pripensu tion, ĉar ne oftas somero, kiam E-aranĝoj tiel proksimas geografie kaj laŭdate!

Stefa HANISCH, Germanio

Per flugiloj de malfacila lingvo

Kadre de kunlaboro inter ILEI kaj TEJO, dum IJK-60 okazas seminario por komencantaj instruistoj de Esperanto — "Flugiloj de Malfacila Vento". Multaj esperantistoj scias pri la problemoj, kiuj aperas dum preparado de E-kurso: necesas trovi lernantojn, elekti bonan instrumanieron, trovi ejon, elprinti lernmaterialojn. Kiel solvi tiujn problemojn, oni instruas en la seminario "Flugiloj…".

Danke al subteno de usona bonfara organizo ESF (Esperantic Studies Foundation), ĉiuj aktivaj partoprenantoj de la seminario ricevos repagon de siaj restadkostoj — do, ilia IJK estos absolute senpaga. Tamen kriterioj de tia "aktiva partopreno" estas sufiĉe severaj. Al ĉirkaŭ 30 seminarianoj instruas kvar instruistoj, en la programo estas fajnaĵoj de Esperanto-gramatiko, superrigardo de diversaj instrumetodikoj kaj la praktika parto, dum kiu oni povos provi sin en instruado (kaj ankaŭ ricevi pritakson de tiu provo).

Nur pro la "Flugiloj…"-seminario jam eblas diri, ke la ĉi-jara IJK estas ne nur distra aranĝo, sed ankaŭ helpas al la disvolviĝo de la Esperanto-movado. Ni esperu, ke la sukcesa seminario ne restos nur tia, sed vere servos al plibonigo de la instrunivelo en Esperantio.

Slavik IVANOV

Profesio: Lenin

Mi babilis 30 minutojn kun Anatolij Ivanovich KOKLENKOV por ekscii, kiu kaŝiĝas malantaŭ la moderna vizaĝo de LENIN. Kaj mi malkovris tre simpatian, afablan viron. Jen li!

“La unuajn 40 jarojn de mia vivo mi pasigis en Taŝkento (Uzbekio). Miaj gepatroj ne havis altan edukon kaj estis malriĉaj. Mi ne povis studi en universitato por ricevi instruistan diplomon. Somere mi laboris kiel estro de infana pionir-ripozejo, sed vintre mi ne havis laboron. Sed… mi ofte aŭdadis, ke mi similas al Lenin. Mi atente pristudis liajn fotojn kaj provis fariĝi pli simila al li, kreskigante similan barbon. La famo pri mi disvastiĝis ankaŭ ekster la najbareco, sed mi ne sciis kaj eĉ ne povis imagi dekomence, ke iam mi povos vivteni min per tiu simileco al Lenin.Virinoj pli atentis min kaj eĉ ŝatis akompani.

Foje, ordigante loĝejon, mi hazarde vidis ĵurnalon kun mencio, ke oni serĉas homojn, kiuj similas al famaj personoj kiel Lenin, Stalin ktp. Do, mi sendis mian foton al Moskvo, kaj poste oni invitis min veni. Tio okazis en 1990. Oni tiam trejnis min dum monato por granda spektaklo kun artistoj en la teatro *Rossia*. Mi estis tre nervoza, ĉar la spektaklon vizitis 5 000 homoj. Tagon poste mia foto aperis sur la unua paĝo de moskva gazeto...

Esperantistoj de ĉiuj landoj – unuiĝu!!!

Mi vivis pliajn kvar jarojn, sed ofte pripensante, ke mi povus gajni monon per tiu simileco al Lenin. Mi do reiris al Moskvo, luis modestan ĉambron kaj iris al Arbat*. Estis kun mi ankaŭ profesia fotisto. Mi ĉiutage faris tion. Jes! Sep tagojn semajne dum pli ol 2 jaroj. Vintre sub miajn ŝuojn mi fiksis ligno-breteton por malpli senti la malvarmegon de la glaci-iĝinta strato…

Komence, duono de mia mono iris al banditoj, kiuj devigis min pagi tion al ili. Mi do decidis iri alilokен kaj iris al la ruĝa placo. Mi donis iom da mono al la gardantoj kaj povis trankvile labori. Iom post iom mi famiĝis kaj aktoris en kvar filmoj kaj ankaŭ en germana televidserio pri la historio de la 20a jarcento. Mi ellernis iom de la germana, angla, ĉina kaj uzbeka lingvoj kun la turistoj. En 2002, en librovendejo mi petis lernolibron de la angla. Oni respondis, ke ĝi momente mankas, sed proponis etan blankan libreton pri Esperanto. Mi tuj ekŝatis tiun ĉi lingvon kaj ekkredis je la ideon de ZAMENHOF - sincera homo, kiu kreis lingvon por faciligi kunvivadon de la homaro. Mi ekŝatis la simplan gramatikon de la lingvo. Poste mi iris al E-klubejo kaj aĉetis multajn librojn. Komence mi sidis en la klubejo, silentis, aŭskultis, sed mia lingva kapablo poste pliboniĝis. Mi legis en Esperanto TOLSTOJ, TURGENEV kaj vere enamiĝis en tiun ĉi lingvon. La mondo kun Esperanto certe estos pli bona.

Intervjuis Normando FLEURY, Kebekio

* Arbat – eble la plej fama strato en Moskvo

ODESA TRAMO

Jen la humura programo, kiun mi (Oleg ĤARITONOV) kaj Vera TINTULOVA alportis el Odeso (Ukrainio), sed ne montris al IJK-anoj pro tempomanko.

Gvidanto: “Ĉu vi scias, kio estas Odeso? Ne, vi ne scias, kio estas Odeso! “Multaj urboj estas en la mond’”, sed simila nenie ekzistas. Rigardu al Odeso ĉe la maro – jen Paradizo!”

Sceno 1. ŜTORMO

- Alarmo! Ĉiuj supren! – ekkriis ŝipestro, aperinte sur ferdeko kun mantelo en unu mano kaj kun martelo en la alia. – Kiu rompis la radion?
- Mi.
- Kiu estas “mi”?
- La radiisto.
- Kial?
- Ĉar ĝi “kaptis” la ŝtormaverton. Oni promesis al ni naŭ balojn, kaj ni ne devus eliri el la haveno.
- Sed ni eliris! Kaj ni mortos! Kial vi tion faris?
- Ĉar vi forrabis min.
- Kiam?
- En la infaneco. Vi forprenis mian amatan ludilon.
- Pardonu min.
- Jam malfrue. Nia ŝipo flugas al rokoj.
- Nu, bone. Sed kial vi volas mortojn de via frato kaj viaj kuzoj?
- Ĉar ili eĉ pli malbonas ol vi. Ekzemple unu el ili metis tranĉitajn peklitajn kukumojn en mian botelon da lakto. Alia kuzo forĵetis la ŝlosilon de la nesesejo en la maron…
- Sed kia estas la kulpo de via frato?
- Se mi lin kompatus, li damaĝus al siaj parencoj.
- Sed ĉu vi ne kompatas vin mem?
- Kompatas, sed kion fari…

Gvidanto: Ni ne devas montri al homoj, kiuj staras sur la marbordo, nian malamikecon. Ni kunigu niajn manojn, ho gefratoj! Ili rigardu, ke ni vivis en paco, kaj mortos en paco! (Ili kunigas siajn manojn kaj falas, montrante al spektantoj sian morton).

Gvidanto (daŭrigas): Rigardu de la centro – la samo! Pri kio ni diru… Ĉiu bona urbo devas havi sian propran vizaĝon. Se urbo ne havas ĝin – tio ne estas urbo. Ĉu vi scias, kiamaniere difini, ĉu havas la urbo sian propran vizaĝon aŭ ne? Vi ne scias? Do mi al vi diros.

Vi venis en la urbon unuafoje, sed al vi ŝajnas, ke vi jam vidis ĝin, - tio signifas, ke la urbo ne havas sian propran aspekton. Pri Odeso oni neniel povas tion diri. Ĉu vi venis ĉi tien por ekvidi teatron? Ĝi estas ja ĉie. Senpaga, gaja, vivoĝoja, originala. Ni ne parolu pri la Opera aŭ Drama teatro – tien oni venas kontraŭ mono. La vivo, bolanta sur la stratoj, bazaroj, plaĝoj de Odeso – jen estas vera teatro! Ĉu vi ne kredas al mi? Tiam hastu okupi la lokojn en nia tramo! Ni invitas vin al la ekskurso tra Odeso.

Gvidanto (surmetante alian veston): Teatro komenciĝas de vestejo, urbo komenciĝas de stacidomo.

Sceno 2. CELSTACIO

Vivis iu virino, kiu ne sciis, kion ŝi volas. Eniris ŝi, ekzemple, en ĉapetbutikon kaj komencis ĝeni la vendistojn: “Donu al mi tiun ĉapeton, ne, pli bone alian!” ktp. Kaj iam ŝi eniris stacidomon:

- Mi volas veturi al Usono!
- Ĉu vi freneziĝis? Vagonaroj tien ne iras!
- De la idioto mi aŭdis! Nur ĝis la limo!
- Kiu limo?
- Ĝis la limo kun Britio!
- Sed, sinjorino, vi troviĝas en Odeso… Al vi pli bone estus aĉeti aviadilbileton…
- Ne! Mi havas klostrofobion!
- Do, aĉetu ŝipbileton…
- Sed vi ja ilin ne vendas…
- Jes, mi ne vendas ŝipbiletojn.
- Mi celas ĝuste tion!
- Sinjorino, ĉu via edzo ne diras ofte, ke revas pri silento?
- Jes. Tion li ofte diras.
- Tial prenu la ŝipbileton ĝis Usono! (Li donas al ŝi la bileton). Mi kaj via edzo ripozu!

Stacidomo: *entorentas svarmo de gastoj kun surskribitaj valizoj: Nomoj de urboj, el kiuj venis la partoprenantoj. Ili trakuras la scenejon kaj foriras; restas nur la Ludantoj (kvin personoj) kaj la Gvidanto.*

Monumento al Duko RICHELIEU

En tramo:

- Hej, junulo, ne kuŝiĝu sur min!
- Ha, pri kio vi revas!

Gvidanto (jam kiel tram-konduktoro): Privoz. La haltejo por tiuj, kiuj ne timas malbeligi sian figuron. En tiu plej granda Odesa bazaro vi povas aĉeti ĉion: moldavajn vinberojn kaj kartvelajn mandarinojn, belorusajn fungojn kaj nian kutiman nigramaran makrelon (en formo de importita konservaĵo).

Privoz. (*La pasaĝeroj iĝas aĉetantoj)*

- Vendistino: Rigardu vi, rigardu, kia belulino marŝas! Ĉarmo! Ŝiko! La feliĉo de sia edzo! Madam, prenu de mi fiŝon!
- Kiom kostas tiu makrelo?
- Dekopo kontraŭ dek dolaroj.
- Kial tiom multekoste?
- Por vi multekoste?! Do demetu la robon, saltu en la maron kaj fiŝkaptu mem! Rigardu vi al tiu lentugplena muzelo! Kaj ŝi imagas sin belulino!

- Fiŝoj! Senpage disdonataj!
- La platfiŝoj!
- Bonvolu doni.
- Tridek hrivnojn*!
- Sed vi diris ja: senpage?
- Ĉu tridek hrivnoj por tiu bonegaĵo ne estas senpage?!

* hrivno – ukrainia valuto

(La aĉetanto foriras kun mikroskope malgrandaj fiŝetoj. Dume la pasaĝeroj denove plenigas la tramon).

En tramo:

- Konduktoro:
- Civitano en ĉapelo, ĉu vi aĉetis bileton?
- Certe, jes.
- Atingu la hejmon tiel, kiel vi la bileton aĉetis!

Konduktoro: La haltejo “Primorskij bulvardo”. Fama loko. Kiom da homoj ĝi feliĉigis, kunliginte ilin por ĉiam; kaj kiom da homoj ĝi malfeliĉigis, farinte la samon!

Proksimiĝu ankaŭ ni al ĝiaj ombraj aleoj. Tie, apud la monumento de la Duko Armano Emanuelo RICHELIEU (riŝelje), fama Odesa urbestro, promenadas gastoj de nia urbo.

Sceno 3. PSALMLIBRO

Al avarulo ekiras lia filino kaj diras:

- Mi volas havi psalmlibrojn.

“De unua flanko mi nun elspezos, – pensas li, irante en vendejon. – Sed de alia flanko, se ŝi fariĝos monaĥino, do mi ŝparos multe pli da mia mono”. Li eniras vendejon kaj demandas:

- Ĉu vi havas psalmlibrojn? *(Vendisto staras ĉe vendotablo kaj malsaĝe ridetas).*

- Jes. Ni havas librojn, kiujn ne estas hontinde donaci al homoj.

- Mi bezonas malajn.

- Malajn? Ĉu vi volas aĉeti libron, kun kiu eĉ estos honte eniri en necesejon?

- Jes, ne, - komencas maltrankviliĝi la avarulo, - mi volas aĉeti psalmlibron por mia filino.

Rideto momente foriris de la vizaĝo de la vendisto. Sed nur por unu momento. Sekvan frazon li diris denove kun sia idiota rideto:

- Ni havas belajn grandajn multekostajn Bibliojn.

Vendisto ja ĉiam estas vendisto…

- Mi volas la plej malmultekostan malgrandan psalmlibrojn! – preskaŭ ekkrias la avarulo. – Ŝi estas nur sepjaraĝa!

Sed la vendistoj jam portas torento de reklama elokventeco.

- Ni havas belan Biblion, eldonitan en mil oka jaro! Ĝi kostas sep mil eŭrojn. Tio estas tre malmulte, se konsideri, ke ĝi vivos ankoraŭ ducent jaroj.

- Mia filino tiom ne vivos! – ekkriegis la avarulo. – Voku la ĉefon!

- Aŭ doni psalmlibron? – time demandas la vendisto.

- Aŭ doni psalmlibron. Malgrandan tian…

- Sed kial ne Biblion? Malgrandan tian… Via filino ekscios multajn interesajn aĵojn pri hebreoj.

- Se ŝi estus judino, mi promesas al vi: mi aĉetus ĉiujn librojn en via vendejo, sed ŝi ne estas judino! Tial donu al mi malgrandan psalmlibron.

- Duonon de eŭro. Se vi volas, mi tuj ĝin ĉifos, se vi pensas, ke tio estas tro granda prezo por psalmlibro. Ĝi tiam kostos nur duonon de la prezo.

- Ne, ne, - rapide balbutas la avarulo prenante la libron, ruĝiĝas kaj forkuras el la vendejo. En liaj oreloj longe reeĥas ridegado de la vendisto…

(Monumento de Duko, pentrita sur granda paperfolio, kun truoj por vizaĝo kaj manoj. La konduktoro fariĝas ekskursgvidanto antaŭ preterpasantaj pasaĝeroj).

Konduktoro: Ĉu vi scias, KIAL staras ĉi tie la monumento? Oni diras, ke iam ricevis la Duko RICHELIEU la telegramon de siaj parencoj; vi povas ĝin vidi en lia maldekstra mano.

(La "monumento" malvolvas la paperon kaj legas): "Kara Emanuel, renkontu nin la 12-an je la 18-a horo, ni venas per ŝipo".)

Konduktoro: Foriris la duko por renkonti siajn parencojn, sed kiam li ekvidis grandan amason da ili, li ŝtoniĝis (pro ĝojo, certe!).

Konduktoro (dum pasaĝeroj revenas al la tramo): Mi ne scias kial, sed ĉiujn urbojn oni ĉiam komparas al Parizo. Ano de iu ajn urbo kun fiero diros al vi: "Mia urbo estas malgranda Parizo". Sed Dio vin gardu se vi diros al odesano, ke Odeso estas malgranda Parizo! Li ĵetos al vi malrespektan rigardon kaj kaj respondos: "Odeso estas O-DE-SO! Kontraŭ ajna Parizo mi ne donos eĉ nian Operejon!"

Odeso ĉiam estis sonplena kaj kantema. Dum ne ekzistis Opera teatro, en allogaj odesaj kortoj aŭdiĝis diversvoĉaj arioj:

(sonas odesaj kantoj: Ho Odeso! Odeso-panjo).

Konduktoro: Se oni laŭdos kantiston el Odeso – li povas ie ajn turnei kun sukceso, tion mi al vi diras tutcerte. Jen ekzemplo (gesto al aperinta kantisto, kiu kantas "Boatoj plenaj de mugiloj"). La pasaĝeroj formas ĥoron, kiu kunkantas.

En tramo:

- Mi tute ne komprenas, kial ili nomis tiun ĥoron miksita: - tie kantis ja nur viroj!

- Jes, sed parto da ili scipovas kanti, kaj alia parto ne.

- Aŭskultu, kio ligas vin kun Margarita?

- Kio ligas? La buso numero du!

Konduktoro: La haltejo "Varbazar'", la bazar' por ĉiu var'!

(La pasaĝeroj eliras kaj formas svarmon de aĉetantoj kaj vendistoj)

(Vendisto havas en vendejo kelkajn aĵojn: sapon, ĉapeton por duŝejo, saketon da nuksoj, harsekigilon.)

Aĉetanto eniras vendejon, vidas tiujn aĵojn, levas ilin kaj legas instrukciojn: "Uzu kiel ordinaran sapon" (por sapo), "Dimensio: unu kapo" (por ĉapeto por duŝejo), "Averto! Ĝi enhavas nuksojn" (por saketo da nuksoj), "Ne uzu dum vi dormas" (por harsekigilo). Poste li vidas ŝuojn kaj diras:

- Montru tiujn ĉi ŝuojn.

- Ili ne taŭgas por vi.

- Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon: eble mi por la fratino aĉetas.

- Ĉu la piedon ŝian vi kunprenis?

- Sinjorino, kion vi serĉas?

- Mantelon.

- Jen manteleto el Parizo. Nu, provu! (surmetas la mantelon sur virinon).

- Sed ĝi estas ja tro granda!

- Kie? (La vendisto malgrandigas ĝin dorse permane).

- Nu, provu butonumi.

- Jam malgranda, mi ne povas.

- Kaj nun? (forprenas la manon).

- Kaj nun tro granda.

- La plej freŝa modo: mantelo "Pneŭmatiko". Vi volas, ke ĝi estu malgranda – jen ĝi estas malgranda; vi volas, ke ĝi estu pli granda – do jen! Demetu, ĝi estas tro multekosta por vi.

- Kiom?

- Kvincent.

- Kvincenton da kio?

- Da dolaroj.

- Mi opiniis, da kopekoj.

- Nu, ducent.

- Da kio?

- Da hrivnoj.

- Ne taŭgas.

- Sunon mi nokte ne vidu, malpli ol cent kvindek ne eblas.

- Donu la manon, kaj ni finu je kvindek.

- Kvindeko da kio?

- Da rubloj.

- Estu tiel. Vi havas la mantelon, kiun volis aĉeti ROTHSCHILD mem [rotŝild]; sed pri la prezo ni ne konsentis.

- Jen la kaskedo. Se vi surmetos ĝin, kiu ajn banko donos al vi krediton. Nu, surmetu ĝin sur la kapon. (La vendisto foriras, sed poste subite sin turnas).

- Hej, kie estas tiu ulo, kiu ĵus estis aĉetonta de mi kaskedon?

- Jen mi estas.

- Ne, ne vi. Tiu estis iu ŝtipulo vilaĝa.

- Do mi estas, mi.

- Grafo, vera grafo. Neniam mi vin rekonus. Vi povas tuj de ĉi tie viziti diplomatan akcepton. Aŭ partopreni Internacian Kongreson.

Konduktoro: Vere, bonega ideo. Portu nin, Odesa tramo, al Internacia Junulara Kongreso. Eble, tie ni povos transdoni al la publiko parteton de tia gaja humoro, kiu ĉiam regis en nia suda urbo, internacia haveno, urbo de gajaj kaj spritaj homoj. La sekva haltejo – Kovrov!

(Ĉiuj prenas grandan afiŝon "ODESO-KOVROV", kaj, montrante ĝin al publiko, "la tramo" forveturas.)

La unua de aprilo en Odeso: karnavalo

Kial (re)membriĝi en TEJO?

Ĉu vi konas la Tutmondan Esperantistan Junularan Organizon? Jes, estas ĝi, kiu organizas ĉiujare la Internacian Junularan Kongreson (la IJK, en kiu vi nun partoprenas!) kaj eldonas la Pasportan Servon - la tutmondan senpagan gastigservon!

TEJO estas organizo *por* la junuloj mastrumata *de* junuloj. (Re)membriĝante en ĝi vi rajtos je la jenaj servoj:

Rabato en IJK!

ses numeroj de la socikultura revuo *KONTAKTO*!

ses numeroj de la junulmovada revuo *Tejo Tutmonde*!

ebleco aliĝi al la TEJO-seminarioj kun tre avantaĝaj financaj kondiĉoj!

la Jarlibro de la Universala Esperanto Asocio kaj la ebleco malfermi UEA-konton!

La kotizo por membri en TEJO ne estas tiom alta, sed pere de ĝi vi tre subtenas la junularan movadon. Ni kalkulas je via helpo! Do ne hezitu, aliĝu por la jaro 2004 aŭ jam por 2005! Faru tion tuj kaj ne zorgu plu! Kuru al la TEJO-tablo sen atendi kaj aliĝu! Aŭ faru tion rete, ĉe <www.uea.org>.



Bertrand HUGON,
Prezidanto de TEJO

Abonu TEJO-Aktuale - senpagan ret-bultenon de TEJO. Informiĝu: <www.tejo.org>.

Kotiztabelo de UEA por 2004

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	37	92	55	33	184
Austrio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Belgio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Brazilo/eŭro	5	11	27	16	10	54
Britio/pundo	6	14	36	23	14	72
Bulgario/eŭro	5	11	27	16	10	54
Ĉeĥio/krono	190	480	1200	720	430	2400
Danio/krono	65	160	400	255	155	800
Finnlando/eŭro	9	22	54	34	20	108
Francio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Germanio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Greklando/eŭro	9	22	54	34	20	108
Hispanio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Hungario/forinto	1400	3600	9000	5400	3200	18000
Irlando/eŭro	9	22	54	34	20	108
Islando/eŭro	9	22	54	34	20	108
Israelo/eŭro	7	17	43	26	16	86
Italio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Japanio/eno	1100	2800	7000	4200	2500	14000
Kanado/dolaro	13	33	82	49	29	164
Nederlando/eŭro	9	22	54	34	20	108
Norvegio/krono	70	180	450	270	160	900
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/eŭro	5	11	27	16	10	54
Portugalio/eŭro	9	22	54	34	20	108
Rusio/eŭro	5	11	27	16	10	54
Slovakio/krono	220	540	1350	810	490	2700
Svedio/krono	80	200	490	310	185	980
Svislando/franko	13	32	85	50	30	168
Ukrainio/eŭro	5	11	27	16	10	54
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/eŭro	6	14	36	22	13	72
TARIFO B/eŭro	5	11	27	16	10	54

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ankoraŭ ne menciitaj.

Mallongigoj:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJ-T – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membrokotizo)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2003 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2003 (t. e. kiuj naskiĝis en 1973 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

Kiel verki per facila lingvo por KONTAKTO ?

Kiam vi verkas por komencantoj, eble vi pensas: “Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?” Provu pensi anstataŭe: **“Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?”**

Eble vi trovos dum la verkado, ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Ankaŭ la redaktoro povas **pli facile simpligi** vian interesan artikolon, ol aldoni intereson al facillingva, sed banala artikolo. Se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi la lingvaĵon, tamen sendu vian artikolon!

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

Facileco: La facillingvaj artikoloj de *KONTAKTO* aperas en du niveloj:

Tre facila: Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de ***Aldone.*** Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klarigi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.

Facila: Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. Aliajn necesas klarigi.

Longeco: Verku ne tro longan artikolon! Prefere ĝi ne enhavu pli ol 800 vortojn. Se vi opinias, ke tio ne sufiĉas, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde.

Stilo: Uzu simplajn frazstrukturojn kun kutima vortordo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verban substantivon, se eblas uzi verbon anstataŭe.

Gramatiko: Je la nivelo ***Facila*** jam estas uzata la tuta baza gramatiko. Je la nivelo ***Tre Facila*** oni ne uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo -anto, necesa en vortoj kiel leganto, prezidanto).

Nomoj: Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne Esperantigu propran nomon, sed uzu Esperantan nomon nur se ĝi jam ekzistas! Prefere uzu nacilingvan (latinalfabetan) formon, kaj aldonu inter krampoj la prononcon.

Aldone uzeblas ĉiuj oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag- kaj monatnomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj kaj la plej konataj mallongigoj.

Abon- **aĉet- adres- aer-** afabl- **aferag-** agrabl- **aĝ-** ajn **akcept-** akr- aktiv- **akval ali-** almenaŭ **alt- am-** amas- ambaŭ **amik-** amuz- angul- anim- **ankaŭ ankoraŭ** anonc- **anstataŭ antaŭ** aparat- **apart-** aparten- apenaŭ **aperapud** arang- arb- **art- artikol- asoci-** aspekt- atak- atend- **atent-** ating- *aŭ aŭd- aŭskult- aŭtobus- aŭt(omobil)- aŭtun-* av- azen-

Baldaŭ ban- bar- bat- batal- baz- bedaŭr- **bel- best- bezon-** bibliotek- bicikl- bier- **bild-** biletbird- blank- blov- blu- bol- **bon-** bord- botel- bov- brak- **bril-** bros- bru- brul- brun- brust- buŝ- buter- buton-

Cel- cerb- centr- **cert-** ceter- cigared- cirkl-

Ĉambr- ĉapel- **ĉar ĉe ĉef-** ĉemiz- ĉes- ĉeval- **ĉi ĉiel- ĉirkaŭ ĉu**

Da danc- danĝer- **dank- daŭr- de decid-** defend- **dekstr- demand-** dens- dent- **desegn-** detal- **dev- dezir-** di- diferenc- difin- **dik- dir- direkt-** disk- diskut- **divers-** divid- **do doktor- dolĉ-** dolor- **dom-** domaĝ- don- donac- **dorm-** dors- drat- dub- **dum** dung-

Eben- **eĉ eduk- edz-** efektiv- efik- egal- ekonomi- ekskurs- ekspozici- **ekster** ekzamen- **ekzempl-** ekzerc- **ekzistel elekt-** elektr- emoci- **en** energi- erar- **esper-** esplor- esprim- **est-** estim- eventual- evolu-

Facil- faden- fajr- **fak- fakt-** faktur- **fal-** fam- **famili- far-** fart- **feliĉ- fenestr-** fer- feri- **ferm- fest-** fiks- **fil- film- fin-** fingr- **fiŝ-** flag- **flank-** flav- **flor-** flu- **flug- foj-** foli- fond- font- **for forges-** fork- **form- fort-** fos- **fot- frap- frat-** fraŭl- fremd- frenez- freŝ- frost- **fru-** frukt- fulm- fum- **funkci-** fuŝ-

Gaj- gajn- gas- gast- **gazet-** glaci- **glas-** glit- **grand-** gras- gratul- **grav-** gren- griz- **grup-** gust- gvid-

Ĝarden- ĝen- **ĝeneral-** ĝentil- **ĝis** ĝoj- ĝu- **ĝust-**

Ha halt- har- haŭt- **hav-** haven- **hejm-** hel- **help-** herb- **hieraŭ histori-** ho **hodiaŭ hom- hor-** horloĝ- hotel- hund-

Ide- ideal- imag- imit- industri- **infan- inform-** insekt- insign- **instru-** insul- inteligent- intenc- **inter interes-** intern- **invit- ir-**

Ja **jam jar- je jen jes** juĝ- **jun-** jup- just-

Ĵet- ĵus

kadr- kaf- **kaj** kajer- kalendar- **kalkul- kamp- kant-** kap- kapabl- **kapt- kar-** karb- kart- kased- kaŝ- kat- **kaŭz-** kaz- **ke kelk-** kilogram- kilometr- kis- **klar- klas-** klin- klopod- **klub- knab-** kol- **kolekt-** koler- **kolor-** komb- **komenc- komerc-** komfort- komisi- komitat- kompar- kompat- **kompren-** komput- **komun-** komunik- **kon-** koncern- kondiĉ- konduk- konfes- **kongres-** konkret- **konsent-** konserv- konsider- **konsil-** konsist- konstant- **konstru- kontakt- kontent- kontraŭ** kontrol- konven- konvink- kopi- kor- korb- korespond- korp- kort- **kost-** kostum- kovert- kovr- krajon- kre- **kred- kresk-** kri- **krom** kruel- krur- kudr- **kuir-** kuk- kuler- kulp- **kultur- kun** kupon- kur- kurac- kuraĝ- **kurs- kuŝ-** kutim- kuz- kvadrat- kvalit- kvankam kvant- kvazaŭ

La **labor-** lac- **lag- lakt- land-** lang- **larĝ- las- last-** laŭ **lav- lecion- leg-** legom- leĝ- **lern-** lert- **leter- lev- liber- libr- lig-** lign- lim- **lingv-** lini- lip- list- lit- liter- **literatur- log- lok- long- lud-** lum- lun-

Man- **manĝ- manier- mank-** mantel- **mar- mark-** marŝ- mastr- **maŝin- maten-** material- mebl- medi- **mem membr- memor-** mend- mens- merit- **met-** metal- **metod-** metr- **mez-** mezur- miks- **milit- minus- minut- mir-** modern- mok- mol- moment- **mon- monat- mond- mont- montr- morgaŭ mort- mov- mult-** mur- muŝ- muze- **muzik-**

Naci- nağ- **nask- natur-** naz- **ne** nebul- **neces-** neĝ- nek nep- neprneŭtral- nev- nigr- nivel- **nokt- nom-** nombr- nord- normal- not- **nov-** nu nub- **numer- nun nur**

Obe- objekt- odor- **ofic- oft- okaz-** okcident- okul- **okup- ol** ole- onkl- **opini-** or- ord- **ordinar-** ordon- orel- **organiz-** orient- original- ost- ov-

Pac- **pag- paĝ-** pak- palp- **pan-** pantalon- **paper-** par- **pardon-** park- **parol- part-** pas- paŝ- **patr- pec-** pen- **pend- pens-** pentr- **per perd-** perfekt- period- **permes- person- pet-** pez- **pied-** pik- pilk- **plaĉ-** plafon- plan- plank- plant- plast- **plej plen-** plend- **plezur- pli** plor- **plu** plum- **plur-** plus pluv- po **poem-** poent- poezi- polic- politik- pont- **popol-** popular- **por pord- port- post** postul- poŝ- **pošt-** pot- **pov-** praktik- prav- **precip-** preciz- **prefer-** preĝ- preleg- prem- premi- **pren- prepar- pres- preskaŭ pret-** preter prez- **prezent- prezid- pri** princip- **printemp- pro problem- produkt-** profund- program- progres- projekt- **proksim-** promen- promes- propon- **propr- prov-** prunt- **publik-** pun- punkt- pup- **pur-** puŝ-

Rad- **radi- rajt- rakont-** rand- rang- **rapid- raport- redakt-** reg- **region- regul-** reĝ- reklam- **rekomend-** rekt- religi- **renkont- respond- rest- revu-** rezult- **ricev- riĉ- rid- rigard- rilat- rimark-** rimed- **ripet-** ripoz- **river-** riz- rob- roman- **romp-** rond- roz- rubrik- ruĝ- rul-

Saĝ- sak- sal- **salon-** salt- **salut- sam- san-** sang- sankt- sat- sav- **sci- scienc- se sed seĝ-** sek- sekretari- seks- **sekv- semajn- sen** senc- **send- sent- serĉ-** seri- serioz- **serv-** sezon- **sid-** sign- **signif-** silent- **simil- simpl- sinjor-** sistem- **situaci- skatol- skrib-** soci- soif- **sol-** soldat- solv- **somer- son-** spec- **special-** spegul- **spert-** spez- spic- spir- spirit- **sport- stacist- star-** stat- stel- strang- **strat-** streĉ- **stud-** stult- **sub** subit- sud- sufer- **sufiĉ- sukces-** suker- sum- **sun- super** supoz- **supr- sur**

Ŝaf- **ŝajn-** ŝanc- **ŝang- ŝat-** ŝerc- **ŝip-** ŝir- ŝlos- ŝnur- ŝrank- **ŝtat-** ŝtel- ŝtof- ŝton- ŝtrump- ŝtup- ŝu-

Tabl- tabul- **tagtamen** tas- task- taŭg- te- **teatr-** tegment- tekst- **telefon-** teler- **televid- tem- temp- ten-** teori- **ter-** terur- **tim-** tir- tond- **tra** tradici- **traduk-** traf- trakt- **tranĉ-** trankvil- **trans tre trink- tro trov-** tru- **tuj** tuk- turism- turist- turn- tuŝ- **tut-**

Universal- **universi- tat- urb- util- uz-**

Vagon- valid- **valor- varm-** vast- vek- **ven- vend-** venk- vent- **ver-** verd- **verk- vesper- vest-** veter- **vetur- viand-** vic- **vid-** vigl- **vilaĝ-** vin- **vintr- vir-** viŝ- vitr- **viv-** vizaĝ- **vizit-** voĉ- **voj- vojaĝ-** vok- **vol-** volv- **vort-** vost-

Zorg-

Pri ajnaj demandoj kontaktu la redakcion!